

**Arbetar**

Nr 8 — 10 1953 — Årg. 32

# **Esperantisten**

LABORISTA ESPERANTISTO

---

---



Gamla sta'n

# Mellanfolkligt samarbete

Vilken vacker tanke och värdefullt mål att arbeta för! Det finns många organisationer som har vackra program och de som arbeta inom organisationerna har både vilja och förmåga att göra stora saker, men man frågar sig: Är den nuvarande organisationsformen den bästa?

Alla internationella organisationer arbetar efter samma principer, nämligen med topporganisationer. Med en eller flera ledare försöker man upprätthålla de yttre förbindelserna och i flesta fall utan att förstå de språk som äro nödvändiga, utan är helt beroende av tolkar.

Det är ju meningen att dessa toppmän skall framskapa gynnsamma förutsättningar för ett gott internationellt samarbete. Men är det möjligt för dessa få män, att utföra något positivt arbete?

Vi tar ett ex. låt oss säga, en fredsoorganisation som har förbindelse med Japan eller något annat utomeuropeiskt land. Där sitter i spetsen en ensam man som upprätthåller förbindelsen medelst en tolk. Har denne ledare möjlighet att påverka opinionen inom de japanska fredsoorganisationerna så att dessa medlemmar får en känsla av samarbete. För närvarande blir de endast påverkade av någon skrivelse samt tidningar i egna landet och i sällsynta fall, en talare som talar på ett språk som är oförståeligt för medlemmarna. Det måste till något mer för att skapa den jordmån som är nödvändig för ett gott samförstånd och en känsla av samhörighet. De nuvarande förbindelserna är endast sköra trådar som brister vid första påfrestning. Ty blir toppen kapad, så är förbindelsen slut.

De som upplevde krigsutbrottet 1914, då de tyska fackliga organisationerna brände sina standar och både den fackliga och politiska internationalen gick i spillror, förstår hur lätt en förbindelse blir bruten. Vad hade då inträffat? Hade de serbiska, franska, engelska eller ryska arbetarna och tjänstemännen företagit sig något som kunde skada deras tyska och österrikiska jämlikar. Nej inte alls, ty strax före krigsutbrottet var det solidariska samarbetet det allra bästa, vilket intygades från båda håll. Hur kunde då dessa länders folk ställas mot varandra och med vapen i hand förgöra sina klassbröder? Ja, den största orsaken var väl den, att de inte visste vad som yttrades på andra sidan gränserna. De hade inga förbindelser, blott den abstrakta känslan som finns genom medlemskap i en internationell organisation. Där fanns endast denna sköra tråd som utgör förbindelse mellan topporganisationerna. Där fanns ingen bredare förbindelse mellan folken i respektive länder som kunde skapa en känsla av samhörighet. Där fanns inga massor som hade personliga vänner, vilka de genom brev eller personlig bekantskap lärt känna som goda vänner. Där fanns inte känslan för mellanfolkligt samarbete bland den stora massan, den fanns endast i toppen och hängde på en skör tråd.

För att få fram en samhörighetskänsla måste människorna förstå varandra. Man får inte fram denna känsla genom att-turista-och se på varandra, nej, man måste förstå varandra. Och för att förstå varandra måste man tala vid varandra, ty an-

nars är det omöjligt att eliminera meningsskiljaktigheter. Naturligtvis kan man inte eliminera alla motsättningar om man rätt förstår varandra, men kan man talas vid kan man förklara motsättningarna och genom diskussion lösa de svåra problemen som naturligtvis finns och alltid kommer att finnas.

På grund av bättre ekonomiska betingelser och de snabba förbindelserna mellan länderna är det över en halv miljon svenskar som besöker främmande länder varje år. Om man frågar stora flertalet av dessa resenärer vad de ha gjort under sin resa så blir svaret i flesta fall, de har tittat på det och de har tittat på det och de har sett underliga människor och konstiga varor. Hade inte dessa resenärer varit dövstumma skulle de haft ett annat utbyte av sina resor. Hade de kunnat tala med de underliga människorna kunde de fått förklaring över de konstiga varorna, vilka då inte varit konstigare än deras egna. Om man råkar träffa en resenär som haft förmånen att komma innanför hemmets dörr i det land han besökt, får man en intressantare skildring än en "titta på hus turist" kan ge.

Med detta vill jag säga, att betingelser för ett mellanfolkligt samarbete finns inte, de måste skapas! När miljoner och åter miljoner människor på olika sätt och olika vägar skapat förbindelser med varandra kan vi börja tala om mellanfolkligt samarbete. Men innan detta samarbete kan ha utsikt att lyckas, måste den rätta känslan framskapas inom respektive lands gränser så att ingen anser sig mera värd än andra länders medborgare.

Med detta vill jag inte klandra några organisationer, blott försöka

påvisa, vilka oerhörda arbeten som förestår innan vi får ett verkligt mellanfolkligt samarbete. G. R.

## Sveda Somera Semajno 1954

La ĉijara prelegsemajno en Frostavallen, Svedujo, bone sukcesis, kaj la temaro "Internacia kulturinterŝanĝo" altiris grandan intereson ne nur ĉe la partoprenantoj sed ankaŭ ĉe la gazetaro kaj ĉe la UNESKO-konsilantaro, kiuj ricevis informon pri la prelegoj.

Ni daŭrigos en 1954, kiu jaro estos por ni tre grava. La prelegsemajno okazos 8—15 aŭg. 1954, sekve tuj post UK en Haarlem. Frostavallen situas en la suda parto de Svedujo, kaj oni bone povas atingi la lokon post la fino en Haarlem.

Jam nun oni povas sin anonci al s-ro Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo. La nombro de la partoprenantoj estas limigita. Informojn kaj detalojn pri la programo ni donas poste. Sveda Esperanto-Instituto aranĝos la prelegsemajnon.

## Sveda Esperanto Instituto

havis sian jarkunvenon la 30-an sept. La Direkcio prezentis sian agadraporton, kiu estis aprobatas de la Estraro. Prezidanto de la estraro estas Ernst Eriksson. Prezidanto de la Direkcio estas Karl Söderberg, sekretario-kasisto Yngve Nilson. En la Direkcia kunveno oni decidis aranĝi ferian semajnon ĉe Frostavallen la 8-an — 15-an de aŭg. 1954. La ekzamena tago 1954 estos la 28-an de febr. La adreso de la Instituto estas: Förvaltarvägen 20, Enskede.

SOCIALIST LEADER, semajna, angla-lingva gazeto de la Sendependa Laborista Partio de Britujo seninterrompe dum tri jaroj presigas Esperanto-artikolon, Specimeno havebla kontraŭ 1 respondkupono. Abonebla 12, 24, 52 semajnoj je tarifo 1 numero 1 respondkupono aŭ ekvivalento.

Redaktoro, "S.L." 318 Regent Park Road, Finchley, London. N. 3. (Represo de artikoloj en Esperanto permesata, sed oni menciui la gazeton).

Om alla lär sig esperanto nu,  
kan jordens folk tala obehinrat  
med varandra inom två år.

Kamarado redaktoro.

En numero 1 de A. E. "Den frág-vise herrn' prezentis artikolon, kiu celis diskutigi nin geesperantistojn pri gramatikaj problemoj kaj la nomita demandemulo faris demandojn traktante la prepoziciojn "de", "el", "pro", "per". Permesu al mi, kamarado redaktoro, respondi kvankam mi ne pretendas pri pli grandaj scioj en esperanto ol La demandemulo mem.

Antaŭ ol mi respondas je liaj demandoj, permesu al mi diri mian opinion pri kelkaj konkludoj kaj diroj kiujn li faris. Mi ne konsentas kiam li konstatas ke uzado de fremda lingvo — esperanto estas fremda lingvo por li — premias bonajn sci-ojn en la gepatra lingvo. Male mi volas diri ke korekta uzado kaj scio en esperanto donas pli klaran bildon en la kaosigita gepatra lingvo. Pruvojn pri tio mi havas, ne nur proprajn sed ankaŭ tiujn de aliaj. Ke esperanto estas fremda lingvo ne nur por La demandemulo sed ankaŭ por ni ĉiuj, ĉar ni ĝin devas lerni ĉiuj, kaŭzas proprajn personajn konkludojn kaj perceptojn kaj pensante naciece — tio estas en la gepatra lingvo — ni kreas problemojn kiuj tute ne estas problemoj.

Ankaŭ mi volas diri ke mi dubas pri la utilo publikigi tiajn artikolojn en tiu maniero kiun La demandemulo faris. Kiam li turnas sin al tiuj kiuj havas pli da scioj en la lingvo kaj ne al komencantoj, estus dezirinde kaj konvene ke li estis farinta sian artikolon en esperanto. Nia organo estas propagandilo por esperanto kaj svedtekstaj artikoloj devas tendenci por kaj ne kontraŭ esperanto, kion la artikolo de La demandemulo — eble nekonscie — faris.

Demandinte pri la diferencigo inter "de iu" kaj "el io" en la donitaj ekzemploj, li konstatas ke ambaŭ derivas de deveno aŭ fonto. Mi konsentas sed la deveno aŭ la fonto ne ĉiam estas fiksa sed ŝovebla. Tiuj ekzemploj kiujn li donas, ŝajnas al mi esti ne bone elektitaj por bildigi la multsencecon de "de". Plena Vortaro rimarkigas pro tio ke estas ofte konsilinde anstataŭigi "de", se eble, per pli preciza prepozicio. "Mi aŭdis de li pri la akcidento" — "Mi aŭdas per li...". "Li voĉlegas el libro" — "Li voĉlegas ene de libro". Mi volas doni proprajn ekzemplojn. "Mi aŭdas de la elefanto la trumpetadon", ne diras al mi precizecon. "Mi aŭdas el la elefanto la trumpetadon", diras al mi ke ene de la elefanto devenas la trumpetado. "Mi aŭdas de ĉe la elefanto la trumpetadon", diras al mi mian pozicion same kiel "de sur". La demandemulo povas prunti de mi 100 kronojn el miaj ŝparaĵoj sed ne el mi ĉar mi ne estas ŝparuĵo.

Se oni demandas kial aŭ pro kio li forlasis la urbon, la respondo estas kiel en la donita ekzemplo — "pro diversaj kaŭzoj li forlasis la urbon". Kial Plena Vortaro diras — "mi tremas pro frosto" kaj ne la nepreciza — "mi tremas de frosto", kiun La demandemulo diris, povas esti kaŭze de logiko. Ĉu ne la frostotremo estas de ekstera — "tremi pro frosto", kaj de interna — "tremi de frosto"? La kaŭzo de la tremo estas pro frosto kaj la kaŭzo de la forlaso de la urbo povas esti ankaŭ pro frosto. Se iu ekhavas pomon en la gorgo kaj mortas pro sufokiĝo, li mortas pro la pomo. Se iu manĝas pomon kiu estas venena kaj mortas pro veneniĝo, li mortas de la pomo. Sekve iu mortas




# Sennacieca Asocio Tutmonda

Duon-tagaj ekskursoj en Mosel-valo  
Tut-taga ekskurso tra la Vogezoj-montaro  
Unua geknaba kongreseto  
Post-kongresa tendaro de Junul-fako  
Post-kongresaj ferioj en montaro

Por la unua fojo en la historo de SAT-kongresoj oni havas specialan programon por niaj infanoj. 27a OKK estas vere gratulinda pro ilia kuraĝo klopodoj. Estos speciala programo por la infanoj, allogaj ludoj, ekskursoj, ktp, dum la tuta semajno. Ili akceptas infanojn ek de 5 ĝis 15 jaroj.

Estos ankaŭ amasloĝejoj k tendaro. Ili rekomendos manĝadon en div. restoracioj kun div. prezoj. Plej malmultekosta restado kun amasloĝejo k malmultekosta restoracio kostos proks. 7: 50 po tage.

OKK ankaŭ eldonis belegan afiŝon pri la kongreso k ĝi estas havebla por du (2) respondkuponoj ĉe sekr. de OKK, kdo P. Louis, 96, rue de Nabécor, Nancy, Francio. Ili ankaŭ eldonis belajn glumarkojn 1 folio je 6 pecoj kostas 20 oerojn k havebla ĉe Libroservo de SLEA. Kongresafiŝon ĉiu klubo nepre havigu!



## Kongreskotizoj

Antaŭ 1 aprilo:	
SAT-anoj .....	10: — skr.
Geedzaj .....	16: 50 „
Gejunuloj ĝis 20 jaroj .....	6: — „
(infanoj ĝis 15 jaroj senpage)	
Gasto .....	13: — „
Subtenanta (minimume) .....	4: — „
Post 1 aprilo:	
SAT-anoj .....	13: — „
Geedzaj .....	21: — „
Gejunuloj ĝ 20 j .....	7: 50 „
Gasto .....	16: — „
Subtenanta (minimume) .....	5: — „

Kotizojn vi sendu al Justo Boberg poŝt-  
ĝiro 3815 sed bonvolu noti ke temas pri  
kongreskotizo.

## Jen la provizoro programo:

Kulturaj kunsidoj  
Oficiala akcepto de la Urbo

## Sveda SAT-karavano al Nancy.

Kiel vi jam scias nia 27a SAT-kongreso okazos en Nancy, Francio la 31 julio — 6 aŭgusto 1954. Ĉar nia SLEA-kongreso verŝajne okazos 24—25 julio en Limhamn ĉe Malmö ni planas unue partopreni ĝin k poste veturi tra Trelleborg — Travemünde

pro sindonemo, malfeliĉa amo k. t. p.

Fine La demandemulo demandas ĉu oni vivas de la laboro aŭ per la laboro. Oni povas vivi sen laboro sed kvankam "vivi" en Plena Vortaro ankaŭ signifas "nutri sin", la logiko kaj la racio diras ke por pli klare esprimi kion mi volas diri, estas ja konsilinde uzi "nutri sin" rekte kaj ne "vivi de la laboro". Same kun la legomoj. Kial komplikigi ion kio ne estas komplika. En esperanto oni povas tute klare esprimi sin se oni ne

unue pensas nacilingve sed antaŭ ĉio en esperanto. Lingvaj demandoj estas ĉiam interesaj kaj debatindaj. Sed ili devas esti en niaj rondoj, kluboj kaj inter la geesperantistoj. Kaj se nia gazeto okupu sin per tiaj problemoj, ili devas esti instruaj, kaj la demandoj kaj la respondoj. En tiu direkto mi deziras fari tian proponon al la gazeto oferi lokon por demandoj kaj respondoj en lingvaj problemoj.

La respondemulo.

— Lübeck — Hamburg — Bremen —  
Düsseldorf — Köln — Aachen —  
Liège — Paris k resti tie dum 3—4  
tagoj k poste veturi al Nancy. Kaj de  
Nancy hejmen tra Strasbourg —  
Karlsruhe — Frankfurt — Hannover  
— Hamburg — Köpenhamn — Mal-  
mö — Stockholmo. Prezo estos proks.  
de Stockholmo 269 skr. k de Malmö  
209 skr. inkluzive lokbiletojn. Povus  
okazi prezĝustigo en iu flanko pli  
aŭ malpli. Ni kalkulas ke ni povos  
forveturi de Malmö jam diamanĉves-  
pere aŭ lundematene la 26/7 k ni res-  
tos en Parizo marde ĝis vendrede k  
kalkulas ke ni denove estos en Malmö  
plej laste la 8/8. La prezo de Stock-  
holmo estas kalkulita je minimume  
ro personoj. Se ni estos tiom por la  
SLEA-kongreso sabate por ĝui la ra-  
baton, aliaj kiuj restas ĝis dimanĉo  
aŭ lundo devas kalkuli pri 25 skr. pli  
por la individua bileto al Malmö.

Pli da detaloj vi ricevos poste en  
LE aŭ SLEA-informoj. Se vi havas  
rimarkojn aŭ sugestojn mi tre ĝoje  
akceptas ilin. Vi jam nun rezervu  
vian ferion por viziti k SLEA k SAT  
kongresojn; vi tiel do ĝuos du kon-  
gresojn; dum unu vojaĝo vi tre  
multon spertos k vidos. Vizojn vi ne  
bezonas nur pasporton, kiun vi fru-  
tempe devas havigi se vi ne jam havas.  
Kiam vi aliĝos al la kongreso vi bon-  
volu indiki ĉu vi intencas akompani  
la karavanon aŭ veturi sola. La lasta  
dato por aliĝo estos 15/6 por ke ni  
havu tempon por peti pri rabatoj en  
Danio, Germanio, Belgio k Francio  
k mendi lokbiletojn.

Vi instigu vian klubon por estigo  
de ŝparkonto por via vojaĝo.

Memoru ke vi ĝuas 20 proc. se vi  
aliĝas antaŭ la 30 aprilo al la kon-  
greso. Nu, sukcesajn preparojn mi  
deziras al vi

*justo.*

## SLEA-informoj

La landa estraro admonis dum sia  
kunveno la gekamaradojn en Lim-  
hamn aranĝi la venontjaran kongre-  
son de SLEA. Supozante ke la SAT-  
kongreso okazu en Danio, la inter-  
konsento fiksis la tagojn post ĝi.  
Kiam nun la SAT-kongreso okazos  
en Nancy, la gekamaradoj en Lim-  
hamn konsideras ne oportune aranĝi  
nian landan kongreson tuj poste pro  
la laciga longa vojaĝdistanco por la  
partoprenontoj. P. K. konsentis en  
tio sed sendis admonon al Limhamn  
aranĝi la landan kongreson antaŭ la  
SAT-kongreso kaj en kunligo kun la  
vojaĝplano, skizita de la SAT-peran-  
to en ĉi tiu numero.

La kotizo por la venonta jaro estos  
neŝanĝata. Klubano 7: — (kun gaze-  
to), Familia ano 2: —, unuopa ano  
8: —, Subtenanto minimume 10: —,  
Ni admonas la membrojn pagi sian  
kotizon al koncernaj instancoj kiom  
eble plej frue.

La anoncita internacia ekspozicio  
de la infandeseĝnaĵoj dum la aŭtuno  
1953 donis al P. K. malfacilon en  
unu afero, nome la eja demando.  
P. K. erare kalkulis pri la eblo de tiu  
demando kaj pro tio la ekspozicio  
esti prokrastita ĝis la ejo estas trov-  
ita. Nun tiu malfacilo estas for kaj  
ni povas anonci ke la ekspozicio  
okazos de la 28a de aprilo ĝis la 12a  
de majo, 1954, en la ekspoziciejo de  
De Unga. Nova alvoko estas sendata  
al ĉiuj landoj pri la fina dato por  
alsendo de materialo (15an de febu-  
ruaro 1954) kaj pri la deziro ricevi  
de tiuj landoj kiuj ne estas reprezen-  
titaj en la kolekto ĝis nun.

La gazetara kurso komencas doni  
rezulton per alveno de leteroj de ĉiuj  
partoj de nia lando por korektado  
same por mendoj kaj demandoj pri

esperanto k. t. p. Menciinda estas instruisto en Jämtland, kiu instruas al siaj lernantoj ekster la lerneja lecionaro esperanton laŭ nia gazetara kurso. Kiom ajn kontenta ni estas pri la rezulto, ni tamen devas admoni niajn membrojn aktivigi siajn gekonatojn kaj aliajn pri partopreno en nia kurso.

## Nia gazeto dum 1954

L. E. nia gazeto, kaŭzis al ni multe da ĉagreno dum multaj jaroj kaj ne plej malmulte dum la lasta. Je la kongreso en Borås ni faris decidon kiu ŝajnis al ni tre kontentiga, jes sur la papero, sed ne en la praktiko.

Kiom longe ni ne havas eblecon plene pagi la laboron por la gazeto certe la malfacilaĵoj restos. Se ni havus monon en niaj manoj ni povus postuli de la presisto, ke la gazeto estu preta ĝis certa tago. Sed kiam ni nur havas libervolajn laborfortojn, kaj tiuj personoj devas oferi sian liberan tempon ni ne rajtas postuli ke ĉio fluos akurate.

Al niaj k-doj en Borås ni ŝuldas dankon, ĉar ili presis la gazeton sen elspezoj por la asocio. Ke la aranĝo ne estas tiom facile solvebla, kiom ni ĉiuj opiniis, ne estas la kulpo de niaj k-doj en Borås, ĉar troviĝas okazoj kiuj malhelpas la plej bonan volon kaj diligenton.

P. K. sufiĉe zorge diskutis la gazetan problemon kaj fine venis al la decido, ke ni dum 1954 eldonu la gazeton kvar fojojn. Ĝi aperu en la mezo de ĉiu kvaronjaro. Kaj krom tio ni kompensigos la membrojn per 8 SLEA-informoj. La informoj enhavu asociajn novaĵojn kaj esperantonovaĵojn ĝenerale, kaj la gazeto estos por artikoloj kiuj ne estas aktualaj por la tago, sed tiaj, kiaj ĉiam havas valoron por nia movado.

Se ni povas realigi tian aranĝon, ni opinias, ke la membroj havos nur utilon de tio kaj la kontakto inter la membroj kaj P. K. estos pli bona.

Sed, por atingi bonan rezulton ni devas havi aktivan helpon de la membraro. Do, vi malnovaj kunlaborantoj kaj vi novaj anoj, kaptu la plumon kaj verku!

Se ni eldonu la gazeton je la mezo de ĉiu kvaronjaro ni devas havi la manuskriptojn jam je la komenco de ĉiu kvaronjaro, do, la unuaj tagoj en januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Ni devas havi la materialon tiom frue, ĉar la k-doj kiuj prizorgas la presadon devas atendi ĝis presmaŝino estos libera. Se ni ricevos sufiĉe da materialo ni faros la gazeton 24 paĝan.

Se ni ĉiuj kunhelpos ni certe sukcesos.

P. K.


## Kampanjo Kvinmil

A. Säberg, 10:—. M. Aspenström, 10:—. A. kaj E. Johansson, 15:—. Y. Nilson, 10:—

Kr. 45:—

Antaŭe kvitancita 1.086:—

Kr. 1.131:—



**Ĉeĥoslovakio:** Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝkartojn, S-ro Jire Raba. Markovice 233. CHRUMDIN. Ostrava Junularo deziras kontakton kun la tuta mondo. Skribu al: Libuše Bohanusova. Privozszka 23. Ostrava 1.

**Francio.** Deziras korespondi kun f-inoj 25—30 jaraĵ. S-ro Jean Cezar. Villebarou. (L. et Cher.)

# Ni estas malmmodernaj

Sueda Mondolinguala Revuo, oficiala organo de Sveda Ido Federacio, atingis nian redakcian tablon kaj foliumante en ĝi, oni ne povas ne kun kompato trovi kiel la idistoj provas blovi vivon en si mem per iu kurioza maniero, nome nomi sin modernaj esperantistoj. Komentinte la esperanto-kongreson en Zagreb, ili kiel ordinare akuzas nin ke ni tro-oferas tiom da mono kaj tempo je io kio en nuna stato ne povas esti konsiderata havi ŝancon konduki al la celo. Moderna tempo postulas modernan helplingvon kaj nia lingvo estas konsiderata kiel malmoderna lingvo.

”Esti aŭ ne esti” estas la titolo de artikolo prezentita de la redaktoro por la revuo, H. Röhnisch kaj li volas troigi tiun fakton ke troviĝas tiom da projektoj de Lingvo Internacia ke la ĝenerala publiko opinias la tutan mondlingvan ideon kiel ion ridindan. Li demandas al si kiel eksterulo kredis al la propagandistoj de la mondlingva ideo kaj kiel tiu povas orientiĝi en tiu ĝangalo de ”mondlingvoj”. Li ankaŭ konstatas ke, spite tiuj ”mondlingvoj”, restas nur du aŭ pli ĝuste unu kaj duona konkurantoj sur la batalkampo, nome esperanto kaj ido, kie ido estas la duono, ĉar ido ja ne estas io alia ol esperanto je tri kvaronoj. La kondiĉo por ke mondlingvo havu ŝancon esti agnoskata de la gvidantoj kaj popoloj estas kvar fundamentaj trajtoj: 1, tre facile lernebla, 2, logika, senescepta kaj koncentrata laŭ matematikaj principoj, 3, skribebla, presebla,

telegrafebla k. t. p. per nuntempaj aplikataj teknikiloj, 4, ĝi devas esti facile fluante parolebla kaj havi naturan ritmon.

Ni esperantistoj ne bezonas tro okupi nin per konkurantaj projektoj kaj rilate Idon ni povas konstati ke se estas kiel ili volas kredigi al ni ke ni pro nevolvo reformi nian lingvon, fuŝis la mondlingvan demandon, ilia reformemo, kvankam ni havas ambaŭ saman eblecon influi la publikon, tamen ne kondukis al rezulto, restante nur projekto dum kiam esperanto, fakte kaj reale estas mondlingvo kiom ajn malmoderna ĝi estas.

Ni esperantistoj agas kaj laboras por la mondlingva ideo. Ni faras pozitivajn laborojn dum kiam la idistoj oferas siajn kolonspacojn en siaj gazetoj por konvinki nin pri nia sensenca ekzisto, kaj sin mem pri sia historia misio surŝultrigi la mantelon de la malmoderna esperanto.

Esti aŭ ne esti dependas de niaj klopodoj kolekti la mondopinion pri la mondlingva demando kaj dume ne indas reformoj kaj plibonigoj de supre. Esperanto devas havi tempon evoluigi en praktika direkto kaj kiam la tempo venos kiam ĝi estos oficiale akceptita, tiam oni povas ĝin plibonigi kaj reformi se ĝi tiam estos reformenda.

Cetere ni rekomendas al niaj idistaj kolegoj pli klopodi kaj kontribui en la laboro por havigi al la mondo ununuran internacian lingvon ol nutri sin je la kosto de la malmoderna esperanto.

Malte Gahlin.



# "Esperantistiska fantasier"

I en ledande artikel i nr 20 — 1953 av IOFF:s skoltidning bemöter artikelförfattaren Einar Adamsons artikel "Aktuella språkproblem i nr 2 — 3 — 1953 av denna tidning". Einar Adamson skulle väl själv ha ingått i svaromål, om han icke nyligen avlidit, men jag tror, att han icke brytt sig om att byta ord med så fanatisk Esperantohatare, som författaren till "Esperantistiska fantasier" tycks vara. Trots sitt hat till Esperanto, synes han ändock vara rädd för det samma, eljest skulle han väl inte offra mer än hälften av tidningens spaltutrymme åt "den löjliga rotvälskan", Esperanto.

Om artikelförfattaren citerat även inledningen till artikeln "Aktuella språkproblem", skulle han varit tvungen att uttrycka sig på annat sätt och icke så förvränga vad Einar Adamson skrivit. Inledningen lydde: "Språkproblemen framträder överallt. Ett meddelande från Strassbourg den 19 sept. 1952 säger:

"Ett förslag inför Europarådet om att antingen engelska eller franska skall införas som obligatoriska skolämnen i hela Västeuropa togs tillbaka i går kväll sedan det stött på motstånd från Tysklands och Italiens representanter."

Ja, naturligtvis. Inte är det väl trevligt för ett folk att bli påtvingat ett annat folks andliga egendom, och det är just detta påtvingande, som Einar Adamson betecknat som förnedrande och fräckt. Han har icke sagt att frivilliga studier av främmande språk vore förnedrande, vilket författaren till "Esperantistiska

fantasier" vill göra gällande genom att underlåta att riktigt återge vad Einar Adamson skrivit (för nog borde väl artikelförfattaren kunna läsa även svenska). Vidare har Einar Adamson sagt, att för 95 procent av dem som i skolorna studera engelska som obligatoriskt ämne blir tiden bortkastad. Om de icke fortsätta frivilligt efter skolgångens slut, ja. Så har väl de flesta läst Einar Adamsons artikel, men författaren till "Esperantistiska fantasier" har fått det till att han menat att endast 5 procent av alla, som studera engelska som frivilligt eller obligatoriskt ämne, skulle kunna lära sig det. Ja, än en gång: Hur har författaren till "Esperantistiska fantasier" läst Adamsons artikel.

"Det verkliga världsspråket är engelska". Nå, hur har då engelskan nått denna utbredning? Icke är det väl på grund av språkliga företräden, utan på grund av Englands territoriella erövringar. Och är vi inte där inne på ett påtvingande igen? Hade dessa erövringar icke skett, hade nog engelskan stannat på öarna och förblivit ett mindre språk. Latinet vann sin utbredning samtidigt med romarnas erövringar och katolska kyrkans frammarsch, men då dessa avstannade blev latinets mera dött än vad Esperanto nu är. Grekiskan, som väl språkligt stod över latinets, vann sin utbredning en gång av samma orsaker.

"Den löjliga rotvälskan" Esperanto har många ivriga förkämpar bland högt bildade personer. Dessa, som väl ha löst sin personliga språkfråga

Konata sveda poeto kaj literaturisto, Stig Carlsson, antaŭ kelka tempo publikigis en la stokholma gazeto *Morgon-Tidningen* artikolon sub la rubriko "Mortaj lingvoj", en kiu li asertis, ke esperanto estas ŝtone morta, eĉ pli morta ol la pragreka lingvo. Kiel ordinare, kiam niaj kontraŭuloj atakas nin, ankaŭ li ne bazis sian artikolon sur faktoj kaj veraj argumentoj. En plej simpla kaj facilanima maniero li tute simple deklaris, ke esperanto estas morta. P. K. de SLEA tuj pretigis sin por diskuto, sendante al la verkisto dekon da novaj esperanto-libroj kaj al la redakcio de M. T. artikolon, per kiu ni refutis la eldirojn de la verkisto. Ni ankaŭ invitis lin al publika diskutado pri esperanto. Post du tagoj aperis nia artikolo kaj samtempe s-ro Carlsson respondis. Montriĝis, ke li sciis tre malmulte pri la pozicio de nia lingvo

och behärska flera språk, äro säkert kapabla nog att bedöma om Esperanto har något värde.

I poesien sätts väl ett språks uttrycksmöjligheter på de hårdaste prov, och att även Esperanto lockar till skaldskap visar en nyligen utkommen diktsamling i original på Esperanto av fyra skotska skalder (de kunna väl engelska också, så varför ha de blivit esperantister?)

Jag skulle vilja rekommendera författaren till "Esperantistiska fantasier" att lära sig Esperanto och läsa ovannämnda diktsamling. Han skulle nog då finna, att "den löjliga rotvälskan" duger även till världsspråk.

**Martin Johansson.**

kaj li tute ne montris emon daŭrigi la diskuton. Fine li deklaris, ke li per sia unua artikolo tute ne celis ataki la esperantistojn, kiujn li konsideris bonkoraj idealistoj. Kial li do verkis la artikolon? Verŝajne mankis al li temo. La afero tamen montras, ke esperanton povas ataki kaj mistrakti personoj, kiuj, kiam temas pri aliaj aferoj, certe postulas fakan konon kaj sperton eĉ si mem, antaŭ ol ili sin miksas en disputojn.

En la gazeto ABF, n-ro 7 1953, aperis artikolo: "Ĉu ni estas internacistoj"? La verkinto konstatas, ke nek la sveda laborista movado, nek la sveda ŝtato montras tre grandan intereson por internacia kunlaboro sur vasta bazo, t. e. por stimuli individuan interesigon pri la internaciaj problemoj. Li konstatas, ke la svedoj ne estas internaciistoj sed "pacegoistoj". La verkinto sugestas, ke la ŝtato kaj la popolaj organizoj asignu pli da mono por la studado de internaciaj problemoj, sed li kompreneble ne atentas la ĉefan malhelpon por individua, interlanda kontakto — la lingvan demandon. Ĉu ne estus bona komenco, se oni unue pritraktus la eblojn solvi tiun problemon?

## Nerekomendinda verko.

Sekve de reklamoj aperintaj en "Heroldo" kaj "Boletin" pri Ilustrita Vortaro de Fr. Azorin ni memorigas niajn legantojn pri la averto, kiun la Plenum-Komitato de SAT kaj profesoro Waringhien publikigis sub la supra titolo sur p. 3 de la n-ro 571 (decembro 1952) de "Sennaciulo". S-ro Azorin, ĉefa respondeculo pri tiu verko, traktas kun frivoleco taskon, kiu postulas plej altan lingvan kompetenton.

# La gazeta problemo

Dum pluraj jaroj ni en nia organizo diskutis la gazetan problemon. Tiu problemo fariĝis pli aktuala post la milito, kiam la preskostoj grave altiĝis. Ni facile konstatas, ke la eldonkvanto de la gazeto estas tro malgranda, por ke estos eble financi ĝin per la abonpagoj. Ofte la tutjara enspezo de la Asocio estis englutita de la gazeta konto.

Ĉu tiuj ekonomiaj kaj aliaj oferoj, kiujn ni faris, estis rekompencataj per kreskanta intereso de la anoj kaj ne-esperantistoj? Sendube oni povas respondi: Ne! Finfine ni devas konstati, ke la nacilingva parto de nia gazeto estis kaj estas senvalora. Senhezito mi diras, ke la nacilingvaj artikoloj, certe bonaj kaj bonintence verkitaĵoj, regule ne estis legitaj de pli ol dek personoj, krom niaj anoj. Kaj la anoj ja ne bezonas nacilingvajn artikolojn.

Kial ni do eldonas gazeton kun svedlingvaj artikoloj? Ĉar ni ankoraŭ ne konsciiĝis pri la fakto, ke la por-esperantan informadon ni faru per la tagaj gazetoj, per kiuj ni atingas la grandan publikon, anstataŭ vane klopodi tion atingi per malgranda, organiza gazeto, kiun legas nur la anoj.

Dum la nuna aŭtuno ni atingis, ke 20 svedaj, tagaj gazetoj dum 20 semajnoj sinsekvaj, aperigos nian gazetan kurson. Tiu kurso certe estos pli efika el por-esperanta vidpunkto, ol la svedlingvaj artikoloj, aperintaj en nia gazeto dum ĝia 30-jara ekzisto. Unu el la gazetoj havas eldonkvanton de pli ol 75.000 ekzempleroj kaj eĉ se nur 10 % el la legantoj atentis nian kurson, tiu sumo certe estas pli granda, ol la sumo de tiuj ne-espe-

rantistoj, kiuj dum 30 jaroj legis la svedlingvajn artikolojn en nia gazeto.

Tiaj faktoj validas ankaŭ por aliaj landoj, kie la esperantoorganizaĵoj eldonadas du-lingvajn gazetojn. Ĉu ni estos kontentaj aŭ ĉu serĉi novajn vojojn? Ĉu ne estas tempo forigi la dulingvajn gazetojn, kiuj jam kaŭzis al ni gravajn ekonomiajn perdojn kaj donis al niaj kontraŭuloj sufiĉe da argumentoj por provi supozigi, ke nia lingvo ne taŭgas por trakti ĉiujn temojn kaj pro tio ni devas eldoni dulingvajn gazetojn? Unu gazeto, tute en esperanto ampleksa kaj bone presita, laŭ mia opinio estas pli bona pruvo pri la valoro de nia lingvo, ol dek malgrandaj, dulingvaj gazetoj, mizere aspektantaj.

Mi aŭdacas proponi: La laboristaj esperanto-organizaĵoj en Danio, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio interkonsentas eldoni komunan gazeton **tute en esperanto**.

Ke tiuj kvin landoj estas proponitaj por tia kunlaboro, dependas de pluraj faktoroj: geografiaj, ekonomiaj kaj kulturaj. Ankaŭ la poŝta flanko gravas, ĉar inter tiuj landoj ekzistas poŝta tarifo, kiu ebligas malmultekostan sendadon de presajoj inter la landoj. Tia gazeto estu organiza organo, en ĝi aperu informoj de la landaj estraroj, kronikoj de la kluboj kaj legaĵo por komencantoj. Krome prilingvaj artikoloj, aktualaj artikoloj pri socipolitikaj, sindikataj kaj kulturaj problemoj kaj eventoj en la kvin landoj, recenzoj kaj artikoloj pri la esperanto-literaturo. Tia gazeto neniel povus malhelpi la dezirindan disvastiĝon de la SAT-organoj. Nia gazeto estus interlanda, la organoj de SAT ja estas tutmond-

aj. Oni esploru, en kiu urbo troviĝas du-tri kamaradoj, pretaj akcepti la redaktan laboron. Se tiaj troviĝus en pluraj urboj, oni elektu tiun urbon (landon), kie la preskostoj estas plej favoraj. La ekonomio de la gazeto estu sendependa de la landa organizo, kies anoj estus redaktantoj. Se la abonkostoj ne kovrus la elspezojn, la landaj organizoj egalparte pagu la defecitojn.

Jam antaŭ multaj jaroj oni diskutis similan aranĝon en nia gazeto. En la novembro numera 1939 aperis artikolo (svedlingva) pri tiu demando, sed la verkinto opiniis, ke tia gazeto, tute en esperanto, estas ekster la agadsfero de la landaj organizoj. En tiu tempo, antaŭ kaj ankaŭ post la milito, nia gazeto funkciis kiel plurlanda organo, sed ĝi tiam estis trilingva, dum kelka tempo eĉ kvarlingva: esperanto, sveda, dana kaj norvega. Kompreneble tia gazeto estas eĉ malpli taŭga por propagando ol du-lingva. Tamen la gazeto estis ĉefe organo de la sveda LEA, la nomo estis en la sveda lingvo kaj ankaŭ la ĉefaj artikoloj. Krome la sveda LEA sola respondecis pri la ekonomio kaj portis la defecitojn... Do, la gazeto neniam estis komuna, ĝi estis organo de SLEA kaj la dana kaj norvega LEA-oj estis nur gastoj.

Tia do estas nia propono, kiun mi faras en la konvinko, ke pri ĝi interesiĝos ĉiu laborista esperantisto, en la koncernaj landoj, kiu konvinkiĝis, ke ni devas serĉi novajn vojojn en nia laboro kaj ke ni estu la unuaj rompi la landlimojn. Certe la geografiaj limoj ne malhelpas la efektivigon de la propono. Ĝin malhelpas nur eventuala organiza ŝovinismo.

Yngve Nilson.

## NOVAJ LIBROJ



### Faktoj pri Norvegujo.

64 paĝoj. Eldonita de Chr. Schibstedt Forlag, Oslo. Prezo: 2: 50.

Libreto en la serio "Kiu-Kio-Kie", simila al la libreto "Faktoj pri Danlando, aperinta 1948. "Faktoj pri Norvegujo" enhavas abundon da informoj pri la lando, ĝia historio, ekonomio, kultura vivo k. t. p. Ĝi estas tre riĉe ilustrita per bonaj fotoj kaj desegnaĵoj. Papero kaj preso bonegaj.

### La junaj detektivoj.

Verkis J. H. Sullivan, ilustrita de Brenda Goodwin. 44 paĝoj. Eldonis The Esperanto Publishing Company Prezo: 1: 75.

La libreto, kiu enhavas tre streĉan rakonton pri kontrabandistoj, celas doni legaĵon al geknaboj, kiuj lernas esperanton. Por tiu celo ĝi certe estas tute taŭga, la temo devas interesi kaj kapti la tutan atenton de geknaboj. Temas pri ĝemeloj, loĝantaj en la kamparo, kie ili malkovras kontrabandistojn, subterajn tunelojn, misteroplenan kelon k. t. p. Ankaŭ pli aĝaj legantoj trovas en la libro facilan legaĵon por ekzerco. La stilo estas natura kaj rapida, sed la desegnaĵoj ŝajnas iom arkaikaj.

### Elektroteknika terminaro.

(Esperanta — sveda). Kompilita de Sven Alexandersson. 22-paĝa, multobligita terminaro. Prezo: 1: —.

### Nomaro de svedaj birdoj.

Sveda — latina — esperanto). 16-paĝa, multobligita terminaro. Kompilita de Birger Gerdman. Prezo: 0: 60.

Portu la verdan stelon!

Karl Vanselov: **Nia Lingvo Esperanto**. Tria kajero de unua serio. Enhavas 40 poemojn k kantojn. Eldonis Berliner Esperanto-Verlag, Teupitzer strasse 111, Berlin Neukölln.

Geraldo Mattos: **La Tinto de la Junulo**. 20 paĝa poemlibreto. Mendebla ĉe Gomez Braga, Rua Ramon France 63, Urca-Ria de Janeiro (Brazilo).

Anna Alamo Sandgren: **Religia Vivo en Svedujo**. H. Hubertsson: **La Dia Vojo**. Ambaŭ estas 20 paĝaj. Eldonis Esperanto-Missionen, Klackvågen, Nora Stad.

## TRADUKITA LITERATURO

En antaŭa artikoleto mi menciis la gravecon de nia originala literaturo. Per ĝi aperas je la unua fojo efektiva mondkulturo, sen lingvaj baroj kaj tio estas granda paŝo por estigi la unuecon de la pensoj kaj idealoj de la estonta homaro. Sed ankaŭ la bonaj tradukoj de eminentaj verkoj el la grandaj kulturlingvoj vivantaj kaj mortintaj, meritas en alia senco nian tutan atenton, ĉar la riĉiĝo kaj plena ellaboriĝo de Esperanto kiel kulturlingvo efektiviĝas per tia tradukado farata de kleruloj el ĉiuj popoloj: ĉiu lerta tradukanto enkondukas ion belan el la originala lingvo en Esperanton.

Baldaŭ niaj samideanoj tra la tuta mondo povos ĝui grandskale la belajojn de la brazila poezio en la "Antologio de la brazilaj poetoj", nun preparata de B. E. L. La tradukojn faris nia eminenta majstro F. V. Lorenz.

Ankaŭ la fama "Ceia dos Cardeais", de Julio Dantas, jam aperinta en la lingvoj hispana, itala, franca, angla, germana, sveda k. a., estas aperonta en Esperanto, en bela tra-

duko de Geraldo Mattos. zorge reviziita de Porto C. Neto.

— — —  
La eldono de ambaŭ libroj — "Antologio de la brazilaj poetoj" kaj "Vespermanĝo de la kardinaloj" — liveros al niaj lernemaj samideanoj multan materialon por kompara studado, ĝi estos neelĉerpebla fonto por ellernado de Esperanto kaj espereble aperigos ĉe ni klerajn verkistojn.

(El artikolo de la brazila pioniro Ismael Gomes Braga en "boletim de Esperanto").

## Katolikerna utnyttjar Esperanto.

I staden Lourdes — Frankrike — höll det katolska esperanto världsförbundet sin 24 kongress den 13—16 augusti med deltagare från, England, Belgien, Frankrike, Tyskland, Spanien, Italien, Holland och Saar.

Det viktigaste som behandlades var, den internationella katolicismen och freden. I kongressen deltog många framstående präster och lekmän inom den katolska rörelsen, och tillfredsställelsen var allmän, därför att de kunde föra förhandlingarna på blott ett språk, vilket skapade en vänskaplig och intim atmosfär bland deltagarna.

När skall organisationer som bättre behöver detta hjälpmedel förstå värdet av ett gemensamt språk.



ESPERANTO —  
allas andra språk



## RADIO KRONIKO

Mez-Eŭropa tempo

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado,  
K = Kurso.

### Lunde

22.35—22.40 Wien. 513 m, 48,74 m, 25,46 m. I. Radio Wien IV, Aŭstrio.

### Marde

12.55—13.00 Bern. 48,66 m, 31,46 m, 16,87 m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.

### Merkrede

16.45—17.00 Graz. 417,2 m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrio.

20.30—21.00 Madrid. 225 m, 42,33 m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanio.

22.45—23.15 Valencia. 43 m, P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanio.

23.15—23.20 Hilversum. 298 m, 188 m, I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.

### Ĵaŭde

08.40—08.45 Lille. 218 m. I. Prof. Labit. 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francio.

09.30—09.45 Paris. 348 m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francio.

12.55—13.00 Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.

18.35—18.40 Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.

00.05—00.30 Zagreb. 264,7 m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavio.

### Vendrede

19.00—19.20 Roma. Kiel merkrede.

23.15—23.30 Hilversum. 402 m. P. (nur unu fojon ĉiumonate). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.

### Sabate

09.30—10.00 Rio de Janeiro. 375 m. 30,71 m. K. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.

23.15—23.20 Hilversum. 402 m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

## Muzika kaj mondlingva konkurso "Ariel"

Kun penso pri la aktualiĝanta decido pri la mondlingvo, s-ano Gino Catarzi (Verona) kun la helpo de la Esperanto Grupo de Verona iniciatis kaj asignis sume 50,000 it. liron por la jenaj belartaj konkursobranĉoj kaj por la sub punkto 5. prezentita Premio José Enrique Rodó.

1. **Laŭro Kolomano Kalocsay.** Premio 10,000 it. liroj por la plej bona originala komponaĵo muzika, kantebla, ĝis nun ne publikigita, kies baza teksto estas literaturvalora originala poeziaĵo en Esperanto (aperinta post la komenco de 1930). Unu persono rajtas konkursi per maks. tri komponaĵoj. La teksto estu prezentita sub la muziknotoj.
2. **Laŭro Esperanto 1954.** Premio 10,000 it. liroj, por originala, ĝis nun nepublikigita poemo en la mondlingvo Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1—3 poemoj kun suma amplekso de 108 versoj.
3. **Laŭro Urugvajo.** Premio 10,000 it. liroj por hispanlingva, ĝis nun ne publikigita traduko de literaturvalora(j) originala(j) poemo(j) aperintaj post la komenco de 1930 en la lingvo Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1—3 poemoj kun sume amplekso de 108 versoj.)
4. **Laŭro Verona.** Premio 10,000 it. liroj a) por versa traduko, esperantlingva de la t. n. "balkona sceno" el **Romeo and Juliet** de Shakespeare de la vortoj: "Can I go forward when my heart is here" (II-a akto 1-a sceno) ĝis la fino de la 2-a sceno — kaj parton de la lasta sceno de la tragedio, t. e. tiun parton de la 3-a sceno el la V-a akto, kiu komenciĝas per la vortoj: "Enter Montague an other"; — b) aŭ por tradukita, eventuale originala poeziaĵo en Esperanto, kies temo aŭ medio kaj etoso estas ligita al Verona. En la sub-branĉo b) oni rajtas konkursi per 1—3 poemoj kun sume 108 versoj. La du subbranĉoj estos kune juĝataj por la laŭro.
5. **Premio José Enrique Rodó.** 10,000 it. liroj, aljuĝata al la plej altvalora kaj arte plej elstara konkursaĵo el la kvar branĉoj, pli supre menciitaj.

### Ĝeneralaj Informoj:

Ĉiu poeto kaj komponisto de la tuta mondo rajtas partopreni la konkurson.

Sendu ĉiun konkursaĵon en ses ekzempleroj al la konkursa sekretario d-ro F. Szilágyi, 3-dje Villagatan 26, Borås, (Sved-

Gajajn festotagojn kaj bonan  
novan jaron ni deziras al la anoj.

*Plenum-Komitato de SLEA.*

lando). En la branĉoj 3 kaj 4/b aldonu la saman nombron de la (event.) originalaĵoj Skribu vian pseŭdonimon sur la konkursaĵojn kaj ankaŭ sur apartan paperon kaj metu tiun lastan — se la enlandaj reguloj permesas — en fermitan konverton kune kun via nomo kaj adreso. Pri la konservo de la anonimeco de la konkursantoj en ĉiuj okazoj respondecas la sekretario de la konkurso. Oni rajtas konkursi eĉ sub "verkista" nomo.

Aldonu tri maldekstre stampitajn internaciajn respondkuponojn. Se enlanda regulo ne permesas la elsendon de tiom da kuponoj, sendu laŭ la validaj reguloj malpli. El tiuj landoj, kiuj tute ne permesas la elsendon de kuponoj oni rajtas sendi konkursaĵojn sen aldono de ia kotizo.

Limtempo por la ricevo de la konkursaĵoj el eŭropaj landoj la 15-a de marto, por landoj ekster Eŭropo la 10-a de aprilo, 1954

Pri la kunmeto de la diversnacia komisiono kaj pri lo publikigo de la rezultoj en Montevideo dum la aŭtuno informoj sekvos poste.

Ni riparas viajn ŝuojn  
rapide, fortike,  
elegante



Bäckmans Skoreparationsfabrik  
**AXEL AGLO**

Mäster Samuelsgatan 54 - Tel. 21 03 58  
STOCKHOLM



## Arbetar Esperantisten Laborista Esperantisto

Ansvarig utgivare: *Martin Johansson.*

Redaktionskommitté: Sune Kjellander, Sven Johansson, Folke Rosén.

La gazeto estas organo de svedaj laboristo-esperantistoj.

Anoncprezio: 25 oeroj por mm, klubanoncoj 1 krono por fojo (por jaro 10 kronoj), korespondanoncoj, kiuj enhavas nur nomon kaj adreson, 2 int. respondkuponoj (0,80 sv. krono), por maksimume 25 vortoj: 4 resp. kup.; por 26—50 vortoj duobla prezo.

Abonprezo. Svedio: por jaro 5,00 kr., por 1/2 jaro 2,75 kr. Norvegio: por jaro 5,50 sv. kr., por danoj sama prezo. Ceteraj landoj: por jaro 6,00 sv. kr. (20 int. resp. kup.). Vendprezo por unuopa n-ro 50 öre.

### Sveda Laborista Esperanto-Asocio

*Jarkotizoj:* Klubano: 7:— (kun gazeto). Familia ano 2:—, unuopa ano 8:—, familiano 3:—. Subtenanto minimume 10:—.

### Svenska Arbetar-Esperanto-Förbundet

Barnhusgatan 8, ö.g., n. b., Stockholm. Postgiro 531 60. - Tel. 20 04 24.

### Sveda SAT-peranto

Justo Boberg, Stureby folkskola. Telefono 47 57 00. Poŝtĉeka konto 3815.

*Jarkotizo:* 8:— sv. kr. inkluzive Sennaciulo kaj jarlibro.

Familia kotizo: 3:— sv. kr. sen gazeto kaj jarlibro.

Nov- kaj realiĝantoj pagas po 50 oeroj.

# NOVAJ LIBROJ

**Historio S. A. T.** 152 paĝoj. Ilustrita. Prezo: 6:75. Ĉiu, kiu interesiĝas pri la Laborista Esperanto-Movado, pri la originoj kaj la tuta disvolviĝo de la SAT-movado, devas posedi tiun ĉi verkon.

**Poemoj de Omar Kajam.** 60 paĝoj. Prezo: 3:50 Traduko rekte el la persa lingvo de Waringhien.

**Antologio de brazilaj rakontoj.** 310 paĝoj. Prezo: 12:— (Nur broŝuritaj), 33 aŭtoroj, 33 rakontoj, 33 tradukintoj. Rakontoj elektitaj de la Brazila Beletristika Akademio kun antaŭparolo de Akademia prezidanto. Valora kaj tre bela libro.

**Kvaropo.** Poemoj de la skota skolo, Auld, Dinwoodie, Francis kaj Rosetti. 270 p. 22×16 cm. Belega libro, eldonita de la nova eldonejo "Stafeto, Kanariaj Insuloj. Prezo: 8:— (nur broŝuritaj).

**La Normandaj Rakontoj** de Guy de Maupassant, tradukis R. Dupuis. 222 p. tutaĝaj bildoj. 19 noveloj. Bindita 15:—.

Mendu ĉe SLEA, Barnhusgat. 8 n.b. ö.g. Stockholm C

## Akvarioamantoj Atentu!

Antaŭ unu jaro oni fondis en Nederlando mondfederacion de akvarioamantoj (Aquariumus olcumenae nov. spec.) El multaj landoj estis reprezentantoj, Anglio, Francio, Germanio, Italio, Belgio, Aŭstrio, Svedio kaj Irlando.

En la protokolo estas ne miskomprenbla frazo, ke la lingvo estas granda malfacilo kaj mi volonte konsilu "Lernu Esperanton!" Oni intencas aperigi trilingvan revuon, enhavanta sciencajn artikolojn kaj krome deziras la jenon: 1e; Komuna interŝanĝa fundamento por plantoj kaj fiŝoj. 2e; La necesa kontakto precipe pri la tropikaj regionoj. 3e; Interŝanĝado de plantoj kaj vivantaj fiŝoj. 4e; Interŝanĝado de pensoj, ideoj kaj legaĵoj (koncerne al tio oni pensas pri traduk servo) 5e; Reciprokaj vizitoj inter la akvarioamantoj por pristudi la metodojn en aliaj landoj. 6e; Kontrolado pri fiŝmalsanoj en la kulturejoj kaj kolektejoj. 7e; Financa esploro pri la tuta plano.

Ĝeamikoj, vi komprenas, ke aliĝo al tiu Federacio estas nur por personoj scipovantaj legi kaj paroli la francan, anglan kaj germanan lingvojn. Kiom ajn bona estas

la intenco, por ni, simplaj laboristoj, tio estas tro multekosta kaj la lingvoproblemo nesolvita.

Mi scias, ke multaj esperantistoj posedas akvarion kaj ankaŭ ili pristudas la vivon de la fiŝoj, generadon ktp sed scias malmulte pri la natura medio de la fiŝoj, ekzemple, kia estas la kalkenhavo de la akvo? De kio vivas la fiŝoj? Kia estas la fizika eco de la akvo? Vi komprenas, ke mi havas ankoraŭ multajn aliajn demandojn. Tial mi direktas al ĉiuj akvarioamantoj esperantistaj la demandon: ĉu vi interesiĝas pri internacia perkoresponda kontakto (eble revuoj)?

Ni povas helpi la Internacian Federacion. Ni povas helpi viajn samlandanojn. Via amatoreco fariĝos pli altnivela kaj ni montros al la mondo la nepran neceson de komuna lingvo por tiaj internaciaj rilatoj, en kiuj Esperanto povas montri sian taŭgecon kaj utilon. Kaj la lasta demando estas: ĉu estas eble kombini tion kune kun la birdoj kaj la amfibiejoj?

Ĝeamikoj skribu nomojn kaj adresojn al A. Blickman. Schouwstraat 16, Nieuwendam—Amsterdamo. Nederlando.